Kial UK en Montrealo?

Forta loka movado, kun granda sperto pri kongresa organizado (IJK 1992, Nord-Amerika Kongreso 1998, Tut-Amerika Kongreso 2008)

Sed… UK neniam okazis en Montrealo...

Multegaj someraj festivaloj – E-artistoj povos aperi en ne-Esperantaj eventoj!

Facile atingebla de ĉie en la mondo



Ideala urbo por kongresoj! La urba kongresoficejo jam proponis al ni inviti UK-on al Montrealo kaj pretas helpi pri la organizado.

Milda somera vetero

Kulture kaj lingve interesa urbo, kie la lingva demando estas parto de la ĉiutaga vivo



Malmultekosta kompare kun aliaj urboj en Nord-Ameriko kaj Okcidenta Eŭropo!

Plej ĉarmaj sciuroj en la tuta mondo! *(ne kredas? demandu montrealanojn!)*

Kial en 2017?

Esperantistoj el la tuta mondo…
Kunfestu kun kanadanoj!

2017 estas la 150-a datreveno de Kanado

2017 estas la 375-a datreveno de Montrealo.

1984:

Kiam UK okazis en Kanado (Vankuvero) la unuan (kaj, ĝis nun, lastan) fojon! Ankaŭ, cetere, la lastan fojon kiam okazis UK en kontinenta Nord-Ameriko...

1910:

Kiam UK okazis la unuan (kaj, ĝis nun, lastan) fojon en la orienta flanko de kontinenta Nord-Ameriko: en Vaŝingtono (Zamenhof mem partoprenis ĝin)!

Tri organizoj – unu teamo!

La kongreson kunorganizos Esperanto-Societo Kebekia, Kanada Esperanto-Asocio, kaj Esperanto-USA.





Ĝis la revido en Montrealo en 2017!